Esperantologio / Esperanto Studies 13, Nova serio 5 (2024)
DOI: 10.59718/ees18435

Antaŭparolo
Esperantologio evoluas

En 1949 Paul Neergaard fondis la revuon *Esperantologio* kaj en neregula ritmo ĝis 1961 publikigis ĝin en la renoma kopenhaga eldonejo Einar Munksgaard. En 1999 Christer Kiselman refondis la revuon sub la nova titolo *Esperantologio / Esperanto Studies* kaj sola estris la redakcion ĝis 2018. En tiu periodo, la revuo aperis en la eldonejo Kava-Pech en Dobřichovice kaj samtempe komencis aperi en rete elŝutebla formo. Nuntempe la revuo aperas kaj rete kaj prese ĉe Mondial en Novjorko kaj ekde 2020 kunlaboris paroj da ĉefredaktoroj: Humphrey Tonkin / Orlando Raola, Humphrey Tonkin / Guilherme Fians, Guilherme Fians / Klaus Schubert. Alternante kvazaŭ valse, parigante malnovulon kun novulo, la aktuala kajero ŝajne adoptas la saman logikon, ĉar ĉifoje ĝin preparis nova duopo: Klaus Schubert kaj Christopher Gledhill.

Ni profitu la okazon de renovigita skipo por fari superrigardon de la studoj eldonitaj en EES de 1999 ĝis nun. Entute troviĝas 60 artikoloj en la pasintaj kajeroj (tio inkluzivas la aktualan – 13an – eldonon).[1] Jen listo de la temoj en ordo de ofteco:

- 16 studoj pri lingva analizo (fonologio, frazeologio, vortfarado, vortordo, ktp.)
- 11 studoj pri Esperantismo kaj la Esperanta movado (aktuala akviveco de societo, historio de nacia asocio, muzeo, revuo, ktp.)
- 7 studoj pri biografio / vivo de notinda Esperantisto[2]
- 5 studoj pri Esperantologio, epistemologio kaj esplora politiko
- 5 studoj pri kompara lingva analizo, lingvokontakto, psikolingvistiko
- 4 studoj pri Esperanta literaturo / poezio (teorio/analizo / tradukado)
- 3 studoj pri Esperanta ideologio (en kompara, kulturscienca, sociologia kadro, ktp.)
- 3 studoj pri terminologio, lingva normigo / normiĝo (Akademio, Fundamento)
- 2 studoj pri lingva politiko (Esperanto kaj lingvaj rajtoj, Seksismo en Esperanto)
- 2 studoj pri interlingvistiko (planlingvoj / variantoj de (pra-)Esperanto)
- 2 studoj pri unuopaj temoj: lingvo-lernado, organizaj aspektoj de Esperantismo.

1 Ni ne inkluzivas recenzojn en la listo.
2 Ni agnoskas, ke kelkaj kajeroj (ekz. la 8a de 2018) enhavas artikolojn, kies statuso situas – pro tute bonaj kialoj – inter analiza studo kaj nekrologo.

Evidente tia listo estas arbitra; ofte la sama studo apartenas al pluraj kategorioj. Tamen estas interese vidi, ke lingvoscienco dominas la terenon. Institucia historio kaj individua historiografio okupas similan pozicion. Inverse, malmultas studoj pri literaturo, poezio kaj la artoj pli ĝenerale. Verŝajne ekzistas pli taŭgaj platformoj (*Literatura Foiro* k.s.). Eble pro la sama kialo malmultas kultur-sciencaj, politikaj kaj sociologiaj kontribuoj, kvankam la manpleno da studoj fine de la listo montras, ke tiaj temoj trovas trafan lokon en la EES-temaro.

Oni ĉiam povas lamenti la maleston de certaj temoj. Kio pri la historio de Esperanta propagando? Kio pri la evoluo de retorikaj strategioj ("ĵurnalisma", "kancelaria" stilo, ktp.), nun facile observeblaj en la *Tekstaro*? Kio pri aludoj al la koncepto "Esperanto" eksster la Esperantosfero? Kaj tiel plu. Tamen indas ripeti la admonon de Fians (2022): malpli gravas la fakto, ke iuj fakoj ne estas sufiĉe reprezentataj ol la fakto, ke mankas fekunda dialogo inter ili.

Por respondi tiun defion, necesus krei novan modelon de scienca komunikado. Repensante la konvenciojn de la tradicia scienca artikolo, la sociologo Bazerman (1988) sugestis novan tipon de scienca studo, kiu aspektus intervjuon inter "Asertanto(j)" kaj "Respondanto(j)". Tia dialogo forigus la (foje nur ŝajnigan) limon inter aŭtoro(j) kaj anonima(j) komentanto(j), kaj eble malakrigus la bedaŭrindan tendencon nur taksi sciencan esploradon kiel konkurencon inter universitataj karieroj. Kun malpli da emfazo pri aŭtora individueco, kaj pli da interdisciplina fokuso, tia modelo povus instigi la pli honeste "konfrontan" debaton, kiun serĉas Fians.

Ĉu EES sukcesos tian revolucion? Ni invitas la leganton juĝi, ĉu estas spuroj de estonta evoluo inter la kovriloj de la aktuala volumo. Iom pli modeste, ni anoncu la enhavon de la 13-a volumo, kiu ĉi-foje havas tri ĉefajn partojn. En la unua sekcio, prezentiĝas du gravaj biografiaj studoj. Unue, Sabine Fiedler kontribuas recenzan nekrologon pri la akademiano, leksikografo kaj indoneziisto Erich-Dieter Krause (1935–2023), kiu respondecis pri du el la plej eminentaj – kaj lastatempaj – dulingvaj vortaroj en Esperantio (*Plena Vortaro Esperanto-Germana / Germana-Esperanto*). Due, Marc van Oostendorp prezentas nekrologon pri la inĝeniero, gramatikisto, eŭskisto kaj interlingvisto Wim Jansen (1948–2024). Sekve, kaj omaĝe al Wim Jansen, ni prezentas la artikolon submetitan de la aŭtoro nur kelkajn monatojn antaŭ lia forpaso. Temas pri detala klasifiko de dekoj da "sentesprimoj" (diskurs-indikiloj pri emocio, sento ktp.) el gramatika kaj pragmatika perspektivo.

En la dua parto de la revuo, aperas studoj aŭ prezentitaj dum la Esperantologia Konferenco kadre de la Universala Kongreso en Torino (2023) aŭ libere submetitaj al la redakcio. En la unua kontribuo, Jouko Lindstedt

pledas pli klaran distingon inter interlingvistiko, kiu traktas Esperanton kiel artefakton, kaj esperantologio, kiu "pli liberige" konsideras ĝin kiel aŭtonoman kulturan fenomenon. En sekva artikolo, Eric Macpherson Bailón celas establi epistemologian bazon por esperantologio, esplorante la metodaron de diversaj homaj sciencoj, kaj prenante kiel kazostudon la ideologiajn rilatojn inter eldonaĵoj de la hispana Esperanto-movado. En sekva studo, Nicola Ruggiero detaligas projekton por kompili helenan-Esperantan vortaron uzante jam ekzistantajn tradukojn de la homeraj epopeoj (demonstrante, parenteze, ke spertuloj pri diakronio ofte uzas la plej modernajn teknikojn). Sekve, Bipasha Bhattacharyya prezentas la historion de la geedzoj Sindhwad, kies revuo *Hindujo* rolis, dum la fruaj jaroj de la 20-a jarcento, kiel kerna nodo en pli vasta reto de aktivuloj. Fine Joseph Essertier proponas opinian artikolon, kiu diskutas la fruajn rilatojn inter Esperanto kaj la proponintoj de reformitaj skribistemoj en Ĉinio kaj Japanio.

En la tria parto de la revuo, José Antonio del Barrio recenzas historion de la Esperanto-movado en Hispanio (Roberto Garvía Soto, *Lengua y utopía. El movimiento esperantista en España, 1890–1936*, 2021). Laste, Klaus Schubert recenzas novan analizon pri Esperanta vortfarado (Ryszard Rokicki, *Enkonduko en la morfologion de Esperanto,* 2022).

Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert

Bibliografio

Bazerman, Charles. 1988. *Shaping Written Knowledge: The Genre and Activity of the Experimental Article in Science*. Madison WI: University of Wisconsin Press.

Fians, Guilherme. 2022. "Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio): unuapaŝa etnografia aliro al tiu studkampo." *Esperantologio/Esperanto Studies* 11, nova serio 3: 108–131. https://doi.org/10.59718/ees72194 (27.04.2024).

Tekstaro de Esperanto [kunordigas Bertilo Wennergren]. 2024. https://tekstaro.com (27.04.2024).